ADORU 374



2. *Ho Savanto*, aman koron
klinu al malforta kri';
mem Vi spertis homan ploron
kiel homo inter ni.
Tra danĝero
kaj sufero
sur la tero paŝis Vi.

3. *Ho Spirito* Dia, venu!
Fonto de ĉiela ĝoj'!
Nin per amo sankta benu,
kaj feliĉo sen aloj' –
pac' sen limo
en animo
post pilgrimo sur la voj'.

LEAD US, HEAVENLY FATHER • M (Rhuddlan): kimra, tradicia, HAM 556, HON 285, LBW 418 • angla T: James Edmeston • E: M. C. Butler, 1966 en HE 148 • AK 137 • ↑ Kol 3,1